


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



Partoprenantoj antaŭ la naskiĝdomo de Julio Baghy en Szeged

3

56-a jarkolekto
2012



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervoĵista Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt
Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500
al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

2-a kovrilpaĝo: **I. Gulyás:** Sur margĝeno de libro

33. **I. Gulyás:** 44-a Landa Amika Fervoĵista
Esperanto-Renkontiĝo

36. **I. Gulyás:** 13 + 1 demandoj

39. **I. Gulyás:** Kroataj esperantistoj kongresis

43. **J. Patay:** Ludwig van Beethoven

45. **J. Patay:** Unika speciala vagonaro

47. **J. Patay:** Fakaj informoj

48. **J. Patay:** MÁV Oficistkleriga Instituto

3-a kovrilpaĝo: **Ni funebras** István Pál

SUR MARGĜENO DE LIBRO

D-ro Imre Ferenczy – kiu estas Honora Membro de UEA, prezidanto de UMEA, membro de la Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio, kaj samtempe li estas la prezidanto de la Kontrola Komitato de nia asocio – verkis libron kun la titolo „Mi estis fervoja kuracisto”. Mi tralegis tiun libron kun granda intereso, kaj mi rajtas diri, ke ĝi estas kuriozaĵo, ĉefe por tiuj homoj, kiuj partoprenis en tiuj vojaĝoj kaj eventoj, pri kiuj li iomete detale skribis.

En la libro D-ro Ferenczy priskribas kelkajn gravajn eventoseriojn:

Pri IFEF-kongresoj okazintaj eksterlande en la sesdekaj jaroj, kiam la vojaĝadoj al eksterlandoj por hungaroj estis malfacilaj problemoj; pri kvin IFEF-kongresoj, kiuj okazis en Hungario, en kiuj kadroj li multe helpis al la LKK, eĉ li entreprenis kuracistan deĵoron dum la kongresaj semajnoj.

Pri UEA-kongresoj, ĉefe ekster Eŭropo, kie ankaŭ mi partoprenis kune kun li dum pli ol tridek jaroj. Multajn eventojn mi jam forgesis, kaj legante la libron revenis la memoroj en mian cerbon. Mi denove travivis la plej interesajn kaj neforgeseblajn kongresajn tagojn, kulturajn programojn, ekzotikajn ekskursojn.

Pri historio de UMEA, kaj pri la IMEK-oj, kiujn mi kontinue atentis, eĉ mi partoprenis en multaj UMEA-renkontiĝoj ĉefe dum la UEA-kongresoj.

Pri FIRAC-kongresoj kaj eventoj. Tiu organizo ankaŭ agadas en la kadro de FISAIC, kaj ni multe povis helpi unu la alian. D-ro Ferenczy enkondukis la radioamatoran programeron dum la IFEF-kongresoj, kiuj kolorigis kaj fanfaronis la kongresojn.

Pri aliaj interesaj temoj, kiel la sportkuracista laboro ĉe la futbaltrupo MÁVDAC, la biografio de Zamenhof, la akvokuracisto Priessnitz la fondinto de la unua Akvokuracada Instituto, la nomdono de la trajnoj.

Tiu ĉi libro prezentas la karieron, la fakan laboron, kaj pli ol sesdekjaran Esperanto-agadon de d-ro Imre Ferenczy. Mi gratulas al la aŭtoro pro la interesa kaj bonstila verkado. Mi devas rimarki, ke mi konstatas unu problemon: tiu libro aperis nur hungarlingve, pro tio multaj eksterlandaj esperantistoj – kiuj rolas en la libro, aŭ interesas pri la temoj – ne povas legi tiun. Do estus dezirinda traduki tion al Esperanto.

István Gulyás

LA 44-a LANDA AMIKA RENKONTIĜO DE LA FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ

Inter la 29-a de junio kaj la 1-a de julio 2012 okazis la 44-a Landa Amika Renkontiĝo de la Fervojistaj Esperantistoj en la urbo Szeged. La renkontiĝon organizis la fakgrupo Kiskunhalas-Kelebia, kiuj jam triafoje gastigis la fervojistajn esperantistojn, kaj eminente, eĉ profesie aranĝis la renkontiĝon. Partoprenis la renkontiĝon 77 esperantistoj, inter ili 11 eksterlandanoj el Ĉeĥio, Germanio kaj Serbio.

La urbo Szeged estas kultura kaj ekonomia centro de la departamento Csongrád. Szeged situas en Sudorienta Hungario, sur ambaŭ bordoj de la rivero Tisza, ĉe la kunfluejo de alia rivero Maros. La loko estis loĝata jam dum la neolitiko, kie la ekloĝantaj homoj transiris al la agrokultura vivmaniero. Multaj popolgrupoj vivis sur tiu teritorio, kaj dum la romia imperio fondiĝis mem la urbo kun la nomo Partiszkon, kaj evoluis sur la dekstra bordo de la rivero Tisza. Poste ĝi etendiĝis sur la maldekstra bordo, sude de la rivero Maros. Post la romia periodo denove venis novaj popolgrupoj, kaj dum la patrujokupo ĝi estis restadejo de la princaj gentoj. El Pensilvanio naĝigante sur rivero *Maros* alvenis precipe salo kaj ligno, pro tio oni konstruis terfortikaĵon por defendi tiujn varojn. La urbo estiĝis granda komerca loko kaj grava trapasejo. La unua skriba mencio pri la urbo Szeged okazis en 1183. En 1498



Urboĉambro de Szeged

Szeged ricevis rangon kiel „Libera Reĝa Urbo”. La mezepokan fortikaĵon okupis la turkoj, kaj tre longe firme tenis ĝin al si. Dum la turka erao Szeged estis grava urbo ankaŭ por



La „Votiva preĝejo“

la turkoj. En la jaro 1686 la aŭstra imperiestra militistaro liberigis la fortikaĵon, kaj en 1719 Szeged denove ricevis la rangon de libera reĝa urbo. 1854 oni konstruis fervojan linion inter Pest kaj Szeged, kiu fervojlinio poste konstruiĝis ĝis la urbo Temesvár, kaj estis la plej grava linio de Hungario krom Budapeŝto-Vieno. La urbon tre damaĝis granda inundo en la jaro 1879, kiam la rivero nokte trarompis la digon kaj inundis la tutan urbon. El inter 5723 loĝejoj restis nur 265 post la inundo. El la tuta Eŭropo alvenis donacoj por rekonstrui la urbon. Ĝustadire oni povas danki al la inundo la nunan urboreguladon, ĉar tiam konstruiĝis pli modernaj kaj pli belaj konstruaĵoj, larĝaj stratoj kaj bulvaroj, belegaj parkoj kaj promenejoj k.a. Dum la dua mondmilito la bombardoj kaŭzis gravajn damaĝojn, kaj post la milito nur malrapide ekiris la rekonstrua laboro en la urbo. Nur en la sesdekaj jaroj komenciĝis la vera evoluado de la urbo.

La nuntempa urbo estas la kvina plej granda urbo en Hungario. Elstaran rolon ludas en la vivo de la urbo la petrolo kaj tergaso, la salamfabriko de Pick, la medikemio, la ruĝa papriko, la malpeza industrio kaj nutraĵindustrio. Ĉi tie funkcianta Scienca Universitato estas unu el la plej bonkvalitaj institucioj de la lando. En la urbo jaro post jaro oni aranĝas famajn kulturajn spektaklojn. La plej famaj estas la „Subĉielaj ludoj de Szeged”. Norde de la urbo troveblas la fiŝlago kaj birdorezervejo, la Blanka lago, kiu ankaŭ estas

turisma vidindaĵo.

Por la amika renkontiĝo donis lokon la studenthejmo de Hungaraj Ŝtataj fervojoj, en kiu kaj la programoj kaj la dormeblcoj estis agrablaj. La organizantoj certigis ankoraŭ eblecon tranokti en la panziono Szenna, en kiu ĉefe la eksterlandanoj loĝis. Jam komence de la renkontiĝo la partoprenantoj spertis la zorgadon de la organizantoj pro la akcepto en la stacidomo kun salutvortoj per laŭtparolilo, pro la rapida lokigo en la kolegio kaj panziono k.a. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj alvenis jam vendrede, kaj partoprenis en la unuaj programeroj de la renkontiĝo.



La muzeo "Ferenc Móra"

La vendreda posttagmeza programo enhavis du kulturajn eventojn. La unua programero estis la vizito al la „Votiva Preĝejo”. La belega kaj impona katedralo konstruiĝis inter la jaroj 1913 kaj 1921 en neoromantika stilo laŭ la planoj de Frigyes Schulek kaj Ernő Foerk. La internon kaj eksteron de la katedralo ornamas amaso de mozaikoj, statuoj kaj reliefoj. La nombro de orgeno-tuboj estas 9040, tiu ĉi orgeno estas la tria plej granda inter la orgenoj de Eŭropo. En la subtemplo de la katedralo estas la tombejo de gravaj ekleziuloj kaj politikistoj. La plej elstara vidindaĵo de la katedralo estas la statuo "Kristo sur la kruco". La kreinto estas János Fadrusz, kiu per tiu statuo gajnis ĉefpremion en 1900 okaze de la pariza mondekspozicio. La alia interesaĵo estas la surplafona mozaiko de la sanktejo, kie oni figuras la Sanktan Virgulinon vestite en speciala szegedstila pantoflo kaj ebenaĵa ŝafistpalto.

Post la vizito de la katedralo la ĉeestantoj vizitis la bibliotekon „Somogyi”, kie estas riĉa



Publikvoja trajneto en la urbo Szeged

esperantlingva kolektaĵo, inter ili multaj verkoj de Julio Baghy. La tutan tablon de la granda salono de la biblioteko kovris multaj malnovaj eĉ pli malnovaj libroj kaj periodaĵoj. La partoprenantoj kun granda ĝojo foliumis tiujn klasikaĵojn. Bedaŭrinde pro la fermohoro de la biblioteko faris finon al tiu ĝuplena tempo.

Poste en la restoracio de la fervoja studenthejmo multaj partoprenantoj rigardis la fervojhistorian afiŝekspozicion. Post la vespermanĝo la vidvino de la mondfama esperantisto Tibor Székely faris projekciadan prezentadon pri la riĉa kaj varia vivo de sia edzo. Ankaŭ ĉi tie mi ege dankas al ŝi la interesan prezentadon.

Sabate post la matenmanĝo la partoprenantoj de la renkontiĝo unue vizitis la muzeon „Ferenc Móra”. La urban muzeon kaj bibliotekon oni fondis en 1883. La novklasika stila domo konstruiĝis en 1896 laŭ la planoj de Antal Steinhardt kaj Adolf Láng. La nova instituto tiam ricevis la nomon „Popolkleriga Palaco”. En la jaro 1950 la muzeo kaj la biblioteko disiĝis, eĉ en 1984 la biblioteko translokiĝis en novan palacon apud la katedralo. La muzeo havas riĉan arkeologian



Partoprenantoj en la fervoja studenthejmo

kaj natursciencan, eĉ numismatikan kolektaĵojn, folkloran tenejon, apotekhistorian kaj belartan ekspoziciojn, memorĉambron de



Partoprenantoj antaŭ la memortabulo de Julio Baghy

la ĵurnalisto, verkisto, eĉ poeto, fondinto de la Muzeo, Ferenc Móra ktp. Krom la konstantaj ekspozicioj okazis intermita prezentado pri la famaj kaj belegaj pentraĵoj de Mihály Munkácsy kun la titolo „Orpeniko”. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj rigardis tiun.

Poste la ĉeestantoj trapromenadis al la „Nigra Domo”, en kiu ili rigardis ekspoziciojn pri la aktorino Manyi Kiss kaj pri la iluziisto Rodolfo. Ankaŭ ni havis eblecon viziti ekspozicion pri la sud-ebenaĵaj popolkostumoj en ĉi tiu domo.

Post abunda tagmanĝo ni povis iomete mallonge ripozi, kaj poste ni iris en la varmega vetero al la Zoologia parko de la urbo Szeged. En la parko ni vidis multajn ekzotikajn bestojn en interesa grupigo, ĉar la bestojn oni prezentas laŭ geografia disvastiĝo. Tiel la vizitantoj povas vagadi la tutan mondon de Afriko tra Azio, Aŭstralio kaj Ameriko ĝis Eŭropo. Estis tre interesa vizito, malgraŭ la somera varmeĝo.

Vespere okazis festa vespermanĝo, kaj poste ni povis amuziĝi kaj danci ĝis noktomezo pere de la muzikisto József Míg. Estis longa, laciga, sed tamen belega kaj ĝuplena tago por ĉiuj partoprenantoj.

Dimanĉe antaŭtagmeze ni daŭrigis la programon de la renkontiĝo. Per publikvoja trajneto ni faris urboviziton dum du horoj. Ni vidis kelkajn belajn kaj konatajn konstruaĵojn kun klarigo, kaj dumvoje ni haltis ĉe la angulo de la stratoj Sôhordó kaj Tekeki, en kiu domo naskiĝis Julio Baghy. La partoprenantoj forlasis la trajneton, kaj kolektiĝis ĉe la

memortabulo de Baghy. La tabulo estas metita sur la muron de la domo de la strato Sôhordó n-ro 9. S-ino Vágóné Zsuzsanna Bárány diris rememoran paroladon. Ŝi mallonge konigis la biografion de la fama poeto, verkisto kaj aktoro, kaj ŝi parolis pri la Esperanto-aktiveco de Julio Baghy. Poste la ĉeestantoj florkronis la memortabulon, kaj faris multajn grupfotojn. Post la solenaĵo la partoprenantoj reveturis al la studenthejmo, sed kelkaj ankoraŭ promenadis en la urbocentro. Ili iris al la ĉefplaco Széchenyi, kie troveblas la impona urbodomo, multaj skulptaĵoj, fontanoj, floroj kaj malnovaj plantanoj. Ili promenadis sur la plej granda kaj longa vendeja strato de la urbo, kaj vizitis la kafejon Virág, kie la revoluciulo Lajos Kossuth lastfoje parolis de sur la balkono al la popolo, antaŭ ol li forlasis la landon por ekvivi en ekzilo. Estis vizitinda interesaĵo la nacia Panteono, kie per statuoj kaj bustoj oni honorigas famajn personojn de la publika, politika kaj scienca vivo de Hungario.

Post la urborigardo sekvis la laborkunsido, pli precize formulante, okazis interparolado pri la movadaj aferoj. La prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio parolis pri la lasta 64-a IFEF-kongreso, okazinta en la germana Esperanto-urbo Herzberg en majo de la kuranta jaro. Li konigis la plej gravajn okazintaĵojn de la kongreso, kaj taksis la rezultojn. La prezidanto parolis pri la nacia kaj la internacia Esperanto-movado. Kelkaj alparoloj helpis la ekkonon de la problemoj en la movada vivo, la lokajn sukcesojn kaj la rezultojn. La eksterlandaj gastoj laŭdis la renkontiĝon. La Esperanto-grupo de Vác proponis organizi la sekvan 45-an Amikan Renkontiĝon en la urbo Vác. Ili preparos detalan proponon, buĝeton ĝis aŭtuno, kiam la estraro de nia Asocio traktos la proponon kaj decidus pri la organizado. Fine la ĉeestantoj konstatis, ke ĉi tiu renkontiĝo bonege sukcesis, al kiu kontribuis la lokaj organizantoj, la helpantoj el Kelebia, Kiskunhalas kaj Szeged. Ĉefe la geedza paro Sutka laboris multe por la sukceso de la renkontiĝo.

Post la komuna tagmanĝo okazis la hejmenveturado, kiu ankaŭ estis zorge organizita per la helpo de la organizantoj. Ankaŭ nun mi dankas al la geedza paro Sutka, kaj aliaj membroj de la fakgrupo Kiskunhalas-Kelebia pro la bonega, entuziasma kaj profesia organiza laboro.

István Gulyás

1 3 + 1 D E M A N D O J

Gábor Pál — la estro de la internaciaj aferoj de VOKE (Landa Kleriga Asocio de Fervojistoj) ĉe FISAIC (Internacia Fervojista Libertempa Kultura kaj Intelekta Asocio); emerita direktoro de la Fervojista Muziklernejo — ricevis altrangan ŝtatan honorigon de la Respublika Prezidento – Kavalirkruco de Hungara Ordeno – okaze de la grava nacia festo de 'la 15-a de marto'. La revuo Hungara Fervojista Mondo jam rememoris pri tiu evento en sia numero 2/2012.

Oni devas prezenti S-ron Gábor Pál nek al la hungaraj fervojistaj esperantistoj, ja per lia kunagado la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio ĉiujare ricevas signifajn ekonomian kaj moralan subtenojn, nek al la eksterlandaj esperantistoj, ĉar Gábor Pál organizis kaj direktis, aranĝis la kulturprogramojn de pluraj IFEF-Kongresoj, okazintaj en Hungario (1995 Pécs, 2000 Budapeŝt, 2004 Sopron), kaj pere tiuj la kulturprogramoj rikoltis grandajn sukcesojn.

Okaze de lia nuna distingo mi intervjuis S-ron Gábor Pál laŭ la tradicia riportsistemo „13 + 1 demandoj”.



Gábor Pál

1.) Kun granda estimo mi salutas Vin. Permesu, ke el mia plena koro mi gratulu pro via ŝtata distingo, kiun vi ricevis pro via eminenta kaj sindona laboro. Vi, viaj kunlaborantoj kaj familio kiel akceptis tiun honorigon?

Trege surprizis min tiu ĉi distingo, ja mi ne kalkulis je tio. Mia altranga honorigo same surprizis mian familion kaj gekolegojn, mi tenas tiun granda honoro. Kvankam tiu estas persona honorigo, sed ĝi spegulas la plenan laboron, sukcesojn de miaj gekolegoj kaj la Instituto. Mi opinias, la distingo tuŝas ĉiun mian familianon, kiuj ĉiam kompreneme kaj tolereme subtenis mian laboron kaj garantiis eblecojn por kviete kaj rezulte labori.

2.) En la jaro 2003 jam vi ricevis altrangan ŝtatan distigon. El kiu okazo Vi ricevis tiun?

Dum la jaroj 2001 kaj 2002 en la kadro de kvin-, resp. tri-semajna turneoj en Usono kaj Kanado ni prezentis la „rock and roll”-stilan historian operon „István a király” (Stefano la Reĝo”) de komponistoj Szörényi-Bródy. Post la turneo – je la efiko de nia prezentado – inter la tie vivantaj junuloj aperis signifa interesiĝo pri la hungara historio kaj literaturo. Unuavice pro la organizo de tiuj ĉi grandsukcesaj rondvojaĝoj, kaj pro la donitaj travivaĵoj al la tie vivantaj hungaroj mi ricevis la distigon „Ora Ordenkruco de

Hungara Respubliko”, okaze de la nacia festo „la 20-a de aŭgusto”.

3.) Koncerne la distingojn, vi ricevis diversajn honorigojn de la fervojo kaj la urba konsilio. Pro kio vi ricevis tiujn?

Modeste mi rajtas diri, ke dum la daŭro de la jaroj mi ricevis tre multajn distingojn de la fervojaj organizoj, urba konsilio kaj teatro. Inter ili la plej signifaj estas la sekvaj:

- en j. 2008 „Ora-grado pro Fervoja Deĵoro” pro la fervojista kultura laboro, okaze de la 60-jara jubileo de la Muziklernejo;



Gábor Pál montras ricevitajn distingojn

- la 15-an de marto 2012 mi ricevis honordiplomon de la XV-a Distrikta Urba Konsilio pro la kultura laboro en la distrikto;

- „Baross Gábor Premio”;

- „Wlassics Gyula Kultura Premio”;

- „Or-emblemo de Fervojistaj Sindikato”;

- „Or-emblemo de Libera Sindikato de Fervojistoj”;

- „Or-emblemo de Asocio de Hungaraj Muzikartistoj kaj Dancartistoj”;

- „Pro Fervojista Kulturo”;

- „Laŭdo de Ĝenerala Vicdirektoro”;

- „Dumviva Membro de Ĉefurba Operetejo”.

Mi povus vicigi plu la honorigojn, distigojn, sed mi opinias, la menciitaj ĝuste prezentas la rekonon de mia kultura agado.

4.) Vi estas emerita direktoro de la Fervojista Muziklernejo. Dum via estrado la Instituto signife evoluigis, famaj kantistoj, artistoj finis siajn studojn en tiu ĉi lernejo. Kiel vi taksas la agadon de la lernejo? Kiuj estis la plej famaj kantistoj, artistoj el inter viaj studentoj?

En 1999 kun la gvidado de Mária Toldy ni kondukis specialan instruon formon, nome la instruadon de la t.n. „muzika teatraĵo”. Mi fieras pri tio, ke per tiu ĉi „Musical Studio” ni fariĝis grava muzika ateliero de la lando. Ne troviĝas teatro en la lando, kie ne rolas niaj iamaj, eĉ nunaj studentoj.

Inter la artistoj estas Enikő Détár, Dóra Szinetár, Lilla Polyák, Kata Janza, Eszter Bíró, Réka Koós, Csilla Auth, kaj mi nepre devas menci ian iaman studentinon Adél Kovács, la artistinon de Radnóti-teatro. El inter la artistoj mi mencias Péter Kállóy Molnár, Pál Fekete, Zoltán Bereczki, Sándor Nagy, Rodrigo Krespo, li estas la nuna direktoro de la teatro en Tatabánya. Longe mi povus vicigi ilin, sed estu sufiĉe tiuj.

5.) Vi havis gravan rolon ne nur en la kultura vivo de la fervojistoj, sed ankaŭ en via loĝloko, en la distrikto n-ro XV-a de Budapeŝto. Via tiurilata aktivado al kiu fako kroĉiĝis?

Ekde 1992 mi penadas kiel socia aktivulo. Du jarojn mi estis membro de la „Kultura kaj Kleriga Komitato”, poste dek jarojn mi laboris kiel membro de la „Komitato de Posedantoj, Havaĵ-administrado kaj Komunumakiro”.

6.) Plurfoje vi menciis, ke vi estis parlamentano. Kiun okupon vi havis en tiu funkcio?

Ekde la reĝimŝanĝo eĉ nuntempe mi laboras kiel specialisto de la „Kultura kaj Gazetara Komitato de Parlamento”.



Kun la aktorino Enikő Détár

7.) Vi estas iu estro de la Landa Kleriga Asocio de Fervojistoj (VOKE). En tiu funkcio vi direktas la internacian laboron de VOKE. Al kio disvastiĝas tiu ĉi laboro?

La internacia laboro de VOKE devenas el nia membreco de FISAIC (Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots – Internacia Fervojista Libertempa Kultura kaj Intelektala Asocio). Mia tasko estas – ankaŭ la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio apartenas al tiu – la helpo kaj kuntenado de la laboro de la hungaraj fakaj sekcioj, ilia reprezentado ĉe la Internacia Asocio.

8.) Vi dediĉis multan energion por funkciigi la fervojistajn kulturcentrojn, akceli ankaŭ la kulturagadon de la fervojistoj. Kiel vi povas efektiviĝi tiujn taskojn kun certa tempo kaj energio, eĉ konsidere je la manko de la financaĵo, ofte kaŭzanta gravan menso-streĉon.

Tiun ĉi laboron oni povas bone plenumi nur el pura koro kaj vivprofesio. Ĉiu-tempe estis problemoj, zorgoj, kiujn oni povis superi. Mi opinias, ke tiuj rezulte funkciantaj fervojistaj kultur-institutoj, kiuj plenumas la kulturajn kaj distrajn bezonojn de la



Gábor Pál salutas la publikon sur la scenejo

fervojistoj kaj iliaj familianoj, ties direktado kaj subtenado estis rezultohavaj. La fervojistaj esperantistoj ricevis hejmon en pluraj kulturdomoj, kie ili povis kunveni kaj aranĝi klubprogramojn, povis lokigi kaj funkciigi siajn bibliotekojn. Je mia sincera konscio kuraĝe mi povas deklari, ke la plejparto de niaj kulturdomoj funkcias je la kontento de ĉiuj.

9.) Via personeco garantias, ke la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA) – kiel iu faka sekcio de VOKE – daŭre ricevas kaj financan kaj moralan subtenojn. Konsidere je la nuna ĝenerala ekonomia situacio, ĉu espereblas, ke – eĉ se malpli mezure, tamen – tiuj ne ĉesos? La Komitato de Voke tenas grava tasko, ke subtenu siajn hungarlandajn fakajn sekciojn. Inter ili elstaran lokon okupas la subteno, helpo de la Fervojista Esperanto-Asocio. Mi opinias, ankaŭ estonte okazos simile, ja laŭ niaj eblecoj ni tenas grava ilian subtenadon laŭ ilia laboro, laŭ ilia kaj enlanda kaj internacia prestiĝoj.

10.) Kion vi opinias pri Esperanto?

Estas interese, antaŭ dudek jaroj multaj opiniis, ke Esperanto malaperos pro la amasa alproprigo de la angla kaj germana lingvoj. Ĝoje oni povas konstati, ke Esperanto vivas sian renesancon, la alproprigo de Esperanto disvastiĝas ne nur en Hungario, sed en Eŭropo, eĉ en multaj ceteraj mondpartoj. En IFEF-kongresoj, renkontiĝoj, UEA-kongresoj partoprenantaj esperantistoj demonstras iliajn entuziasmon kaj la sopiron de la paco, ili pruvas ne nur la gravecon de la lingvo Esperanto, sed ankaŭ la efikecon de la movado. Pro tio niamaniere eĉ ni mem volas helpi, subteni la fervojistajn esperantistojn, eĉ ankaŭ mem la Esperantomovadon!

11.) Kiel vi vidas la penadon kaj estonton de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio?

Pli frue jam mi menciis, ke la proprecia kultura laboro de la esperantistoj ludas gravan rolon en la vivo de HFEA kaj VOKE. La signifa nombro, la entuziasma kaj rezulta enlanda kaj internacia laboro de la hungaraj fervojistaj esperantistoj estas tre grava en la kultura vivo de la hungaraj fervojistoj. Kuraĝe mi povas elparoli, ke mi vidas esperiga ankaŭ ĝian estonton, precipe pro tio, ĉar S-rino Ilona Dávid, la nova prezidantogeneraldirektoro de MÁV vizitis nin kaj promesis la subtenon de la fervojista kulturo.

12.) Kiel vi vidas la situacion kaj estonton de FISAIC?

Nia 60-jara internacia organizo faris gravan



Dum la akcepto

laboron en la kultura vivo de la fervojistoj. Mi opinias, ke la rezultoj de la pasintaj jardekoj povos daŭriĝi. Ankaŭ la laboro de la landaj organizaĵoj de FISAIC pruvas tiun, malgraŭ tio, ke en kelkaj landoj ŝajnas iom da regreso. Mi fidus, ke la eminenta devizo de FISAIC – „Amikeco sen limoj” – mobilizas multajn fervojistajn gekolegojn al kultura kunlaboro.

13.) Via opinio kiam ni povos aranĝi Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson en Hungario,



Intima pritakto

kion eĉ motivas ĝis nun kvin sukcesaj IFEF-kongresoj aranĝitaj en Hungario?

Momente aranĝo de tia grandsingnifa kongreso ne rolas en la plano. Kion la hungaraj fervojistaj esperantistoj aranĝis ĝis nun, tiuj ĉiam akiris bonegan kvalifikon. Tiu ĉi fakto rajtigas diri min, ke mi vidas realan eblecon denove aranĝi IFEF-kongreson ene de 2-3 jaroj. La hungaraj

esperantistoj povas kalkuli je la plena subteno de VOKE.

13+1.) Vi estas eksterordinare agema. Post la emeritiĝo, la aĝon malkonfirmanta via daŭra aktivado ne ĉesis. Kujn planojn vi havas por la estono?

Unuavice mi deziras daŭrigi mian laboron sur la internacia labortereno. Krome oni elektis min prezidanto de la Direkcia Konsilio de la Fervojista Muziklernejo, do mi ne disiĝas de la lernejo. Plue mi estas komitatano de VOKE, estrarano de la „Asocio de la Regionaj Kleriĝaj Institutoj”, krome konsilanto de la estro de la „Nacia Kultura Fondaĵo”, kaj kontrolkomisiano de „RAILCARGO Hungaria”. Ŝajnas al mi ne enuiĝi dum la sekvontaj jaroj.



En la 60-jara solenaĵo de la Muziklernejo

Mi tre dankas vian interesiĝojn pri mi. Mi deziras pluajn sukcesojn al ĉiu membro de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio.

Tiu ĉi intervjuo malfacile venis en la mondon pro la daŭre troa okupado de Gábor Pál. Dum kaj post la preparo de la intervjuo oni plurfoje telefonis al li por ke oni atendas lin je iu pritraktado. Dum tiu multa okupado kiam li havas tempon por ripozi, utiligi la profiton de la pensia aĝo? Mi konas malmultan kunhomon, kiu tiel ageme, agoprete „ĝuas” sian pensian vivon.

Delonge mi konas Gábor Pál, kiu ĉiam speciale atentis la laboron de la fervojistaj esperantistoj. Juste kaj kun deca simpatio li subtenis nian asocion, ĉiam juste kaj kun deca simpatio. Entiuze li partoprenis la preparlaboron kaj aranĝadon de IFEF-kongresoj de Hungario. Mi opinias, ke sen li ni hungaroj ne estus kapablantaj tiel altnivele aranĝi la kongresojn.

Dum la intervjuo mi atentis Lin, kiu eĉ nun entuziasme parolis pri nia bonega, delonge daŭriganta kunlaboro. Mi esperas, ke ankoraŭ longe ni povos kunlabori por kreskigi la nivelon de la fervojista kulturo kaj por la disvastigo de la fervojista Esperanto-movado.

István Gulyás


KROATAJ ESPERANTISTOJ KONGRESIS EN LA URBO KOPRIVNICA

La 10-a kongreso de la kroataj esperantistoj okazis en la urbo Koprivnica inter la 22-a kaj 24-a de junio 2012. En la kadro de tiu kongreso okazis la solena inaŭguro de memortabulo de la iama estrarano de IFEF Ilija Puhalo, en la vilaĝo Koprivnicki Bregi. Okaze de tiu solenaĵo mi partoprenis en la kongreso – kiel invitita gasto – en la nomo de la IFEF-estraro.

La urbo Koprivnica havas pr. 25 mil loĝantojn. Tiu ĉi urbo situas je ne tro longa distanco de la hungara-kroata landlimo, kio estas la rivero Drava. Tra la urbo fluas la samnoma rivereto, laŭ kiu Koprivnica akiris sian nomon. La urbo troviĝas je 85 kilometroj nordoriente de la kroata ĉefurbo Zagrebo.

La historio de la urbo estas iomete longa kaj varia. Supozeble la kernon de la urbo konsistigas la malnova slava setlejo, kombinita

kun postaj kolonioj. Sian gravecon la urbo dankas al ekonomie kaj politike grava trafika situo. Ankoraŭ en la 13-a jarcento ĝi evoluis, dank’ al metiistoj, komercistoj kaj religia vivo. En 1338 Koprivnica akiris privilegiojn de



Inaŭguro de la memortabulo de Ilija Puhalo



Memortabulo de Ilija Puhalo

liberaj imperiestraj urboj. En la dua duono de la 16-a jarcento ĝi fariĝis centro de la militregiona administrado. Ĝia situo proksime al la limo inter la Habsburga kaj Otomana Imperioj influis la ekonomiajn, sociajn kaj demografiajn ŝanĝojn kaj la ĉiutagan vivon. Fine de la 16-a jarcento Koprivnica havis ĉ. kvincent loĝantojn, kaj en la dua duono de la 17-a jarcento jam ĉ. 2500. La plej granda evoluo okazis en la 19-a jarcento, kiam rapide altiĝis la nombro de la loĝantaro, evoluis la industrio, pliboniĝis la socia vivo, estiĝis metiista kaj aliaj modernaj lernejoj eĉ reala gimnazio, konstruiĝis la fervoja linio inter Budapeŝt kaj Zagrebo, kaj poste ĝis Rijeka. Novaj branĉoj de ekonomio estiĝis en la fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcentoj, kiel la agrikulturo, brutbredado kaj naturajindustrio. La plej famaj industrioj estas la „Podravka”, „Carlsberg Croatia”, „Belupo”, kaj la paperindustrio „Hartman”. Nuntempe en la urbo mi vidis multajn novkonstruitajn domojn, kelkajn belegajn preĝejojn, bele flegitajn parkojn, larĝajn stratojn, viglan trafikon kaj amikemajn homojn.

En la kongreso partoprenis pli ol 160 esperantistoj, inter ili 32 eksterlandanoj el 13 landoj. La kongreso komenciĝis vendrede antaŭtagmeze kun la jarkunveno de la Kroata Esperanto-Ligo, kaj poste okazis vizito al la muzeo de nutrado „Podravka”. La nutrajindustrio „Podravka” malfermis la muzeon en 1982 por prezenti la industrian produktoprocezon, kaj konservi je propra ekzemplo la historion por la estontaj generacioj. La etnografia kolekto per laboriloj kaj helpiloj prezentas la produktadon, transporton, konservadon kaj konsumadon de nutraĵoj en la kampara medio de la nordokcidenta Kroatio. La kolekto de la industria teknologio prezentas la historian resumon de la produktoj de la industrio. En la

muzeo oni povas rigardi multajn receptojn de la tradicia kuirarto, dokumentojn kaj fotojn el la vivo de la industrio. Estis interesa programo de la kongreso.

Vendrede posttagmeze okazis kelkaj prelegoj pri Tibor Sekelj, pri la episkopo Štrosmajer, pri ILEI kaj pri la Juna Amiko. Okazis kelkaj libroprezentadoj pri nova libro „Songoj kaj ombroj”, pri „Mapo de naciaj minoritatoj en Serba Respubliko” kaj pri la libro „Azijski krug”.

Vespere okazis koncerto fare de la itala kantisto Emanuele Rovere, kiu ĝojigis la partoprenantojn per siaj enhavriĉaj kantoj. Poste okazis „amika vespero” kaj dancado.

Sabate antaŭtagmeze okazis interesaj kulturprogramoj. En la kadro de tiuj prezentis sin la „Kulturarta Societo Koprivnica”, koncertis operkantisto Neven Mrzlečki, humoran literaturan programon prezentis profesia aktoro Saša Pilipoviĉ. Hungara reprezentanto transdonis oficialan leteron de la urbestro Kaposvár al la urbestro Koprivnica. Okazis omaĝo per „Premio Kalendulo” al la



István Gulyás festparolas



Vizitantoj en la galerio de naiva arto

mond fama artistino Vida Jerman, kiu mortis en la kuranta jaro. Sekvis la rememoro pri la Esperanto-poeto Duro Rašan okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo.

Posttagmeze per specialaj aŭtobusoj ni vojaĝis al la vilaĝo Koprivnički Bregi, kie okazis solena inaŭguro de la memortabulo de Ilija Puhalo okaze de la 75-a datreveno de lia morto. Ilija Puhalo estis la vicprezidanto kaj sekretario de la „Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj” (IAEF), redaktoro de la faka revuo „La Fervojisto”. Li kunlabore kun la prezidanto de IAEF Stevan Stojniĉ entuziasme kaj serioze agadis dum sep jaroj sur la tuta asocia labortereno. La inaŭguron organizis la LKK de la 10-a Kroata Kongreso kaj la Komunumo de la vilaĝo Koprivnički Bregi. La marmoran memortabulon oni metis sur la muron de la iama „Fajrobrigadista Domo”, nuntempe nomata „Socia Domo”, en kiu funkciis la monde unika kamparana



Babilado en la parko de la galerio

Esperanto-societo. Sur la tabulo estas gravurita la vortoj: „Fervojisto, Kulturaganto kaj Esperantisto”. Dum la inaŭguro partoprenis procent personoj. En la nomo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio mi – kiel estrarano de IFEF – faris festparolon. Unue mi parolis pri la Esperanto-agado de Puhalo ĝis lia morto, kaj poste mi taksis la entuziasman kaj efikan laboron de Puhalo, jene: „*Mi rajtas diri, ke sen Ilija Puhalo la fervojista Esperantomovado en tiu ege malbona tempoperiodo estus estinta morta movado. Dank’ al li, dank’ al lia entuziasma kaj sindonema agado la fervojistaj esperantistoj transvivis ĉiujn malfacilaĵojn kaj obstaklojn. Per lia sindona vivo li klarigas al ni, ke ekzistas devoj, kiujn ŝajne neniu preskribas, tamen ni devas devigi tiujn al ni mem. La spirito neniam estingiĝas, sed kun novaj kaj novaj lignoŝtipoj oni devas ekflamigi ĝian fajron. La laboro estas ne nur nia propra privilegio, sed eĉ nia ĝenerala*



Partoprenantoj de la kongreso en Koprivnica



La fortikaĵo en Durdevac

devo. Ĉiu devas mastrumi laŭ tio, kion oni ricevis de la vivo. Ilija Puhalo predikis tion, kion si mem faris kaj vivis. La mallonga vivo de nia samideano Ilija Puhalo rezultis fruktojn. En la nomo de nia organizo – Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio – kaj ĉiuj fervojistaj eĉ nefervojistaj esperantistoj mi klinas mian kapon antaŭ lia memoro. Ni estas fieraj, ke ni havis tiun antaŭulon. Je la memoro de tiu ni inaŭguras tiun ĉi memortabulon honore al li, kio devas fanfaroni kion ĝi malkaŝas al ni”.

Poste rememoris pri la agado de Ilija Puhalo la prezidantino de la Kroata Fervojista Esperanto-Asocio s-ino Marica Brletič. Ŝi akcentis, ke: „La nunaj fervojistaj eĉ ankaŭ nefervojistaj



Belega parko en Koprivnica

esperantistoj povas fiere pripensi al Ilija Puhalo, kiu montris la plej taŭgan vojon por agadi bonrezulte kaj entuziasme en la Esperanto-movado. Ne nur la kroataj esperantistoj ricevis bonegan heredaĵon de li, sed la tuta esperantistaro. Tiu ĉi memortabulo starigas indan memoron al Ilija Puhalo”.

La infana folklorgrupo preparis mallongan ĉarman programon per kantoj kaj dancoj en la

Socia-domo, kaj la Virina societo de la vilaĝo regalis la ĉeestantojn per kukoj kaj trinkaĵoj.

Poste ni veturis al la vilaĝo Hlebine, kie ni vizitis galerion de naiva arto. Hlebine estas vilaĝo, kiu akiris mondan famon kiel lulilo de la kroata naiva arto. La galerio estis fondita en 1968 kiel apartigita fako de la muzeo de la urbo Koprivnica. En la parko antaŭ la galerio estas multaj skulptaĵoj el ligno, kaj en la galerio ni rigardis konstantan ekspozicion pri la pentraĵkolekto de Ivan Generaliĉ, kolekton de vitropentraĵoj de la unua kaj dua generacioj de la originaj pentristoj kaj skulptistoj de la „Hlebina skolo”, kaj la salonon kun portempaj ekspozicioj de artistoj influitaj de la kroata origina arto de la „Podravina rondo”.

Poste la kongresanoj daŭrigis la vojon al la urbo Durdevac, kie okazis plurtaga kultura, etnografia kaj ĉefe turisma manifestacio, bazita je legendo „Kokoj”. Tiu legendo estas ekde 2007 protektita de la kroata Ministerio pri Kulturo, kiel la unua nemateria heredaĵo de Kroatio. Laŭ la legendo la turkoj ne povis sieĝi la fortikaĵon de Durdevac dum 60 tagoj. Poste la malsataj defendantoj elpafis el kanono la lastan kokon (origine: Picoki) en la turkan tendaron. Pro tio la turkoj pensis, ke en la fortikaĵo estas abundo de nutraĵoj, kaj vane sieĝas la fortikaĵon, kaj ili ĉesigis la sieĝon. La loĝantoj de Durdevac pro tio ricevis la moknomon „Picoki”.

Ni povis promenadi en la urbo, aĉetadi el multspecaj varoj, manĝi bongustan frititan kolbason, eĉ trinki bonegajn bierojn. Poste okazis interesa spektaklo pri „Picoki” ĉe la fortikaĵo sur la ekstera scenejo. Fine ni povis ĝui piroteknikan spektaklon. Post noktomezo ni reveturis al la hotelo en Koprivnica. Estis ege interesa programo por la kongresanoj.

Dimanĉe antaŭtagmeze kelkaj kongresanoj faris urborigardon en Koprivnica, kelkaj ĝuis la urbajn naĝbasenojn Cerine. Poste la kongresanoj hejmveturis.

La tritaga kongreso estis inda evento por la kroataj esperantistoj. La organiza laboro, la akcepto de la gastoj, la akurataj programeroj, la amika etoso tenas neforgesebla tiun kongreson. Mi denove dankas la inviton, kaj mi gratulas al la organizantoj, ĉefe al s-ro Josip Pleadin, kiu senlace kaj entuziasme agadis por la sukceso de la 10-a kongreso de la kroataj esperantistoj. Ankaŭ mi dankas la zorgadon kaj akompanon al la kroataj fervojistaj esperantistoj, ĉefe al s-ino Marica Brletič.

István Gulyás

Ludwig van BEETHOVEN

(Bonno, 16. 12. 1770 – Vieno, 26. 03. 1827)

Ludwig van Beethoven devenis el kamparista familio de Flandrio. Laŭ familia tradicio li heredis la ŝaton de la muziko: ja lia avo estis kantisto, ĥorestro, poste muzikisto de la princoelektisto de Bonno, pli poste ĝia dirigento. Ankaŭ lia patro estis kantisto ĉe princoelektisto, sed li havis malfirman karakteron, kaj per sia drinkemo li ruinigis la familion kaj finance kaj morale. La patrino devenis el germana burĝa familio, malsanema, multe suferanta virino estis.

La gepatroj havis sep infanojn, inter kiuj Ludwig estis la plej maljuna. Jam en sia kvarjara aĝo montriĝis la muzika talenteco de la infano. Lia patro perforte volis eduki lin genia infano. La infano multe suferis kaj ploris, lia konsolo estis sole sia patrino.

La plej eminenta muzika gvidanto de Bonno, la kortega orgenisto, poste dirigento Christian Gottlob Neefe estiĝis lia instruisto. Li estis ne nur muzikisto kaj komponisto, sed literature kulturita, ideala muzikpedagogo. Beethoven en sia dekjara aĝo estiĝis lia lernanto, la instruisto konigis al li la plej rimarkindajn muzikajn komponaĵojn, eĉ li enkondukis sian lernanton al la praktika muzika vivo.


Beethoven baldaŭ estiĝis vicorgenisto, poste nomumita membro de la kortega orkestro. Per lia amiko, medicina studento Wegeler li interkonatiĝis kun grafo Waldstein, kiu estis lia unua grandnobela amiko kaj protektanto. En sia nova homa ĉirkaŭaĵo li ambiciis je pli alta erudicio, multe li legis, aŭskultis universitatajn lekciojn.

En 1787 Beethoven iris al Vieno por ke li povu esti studento de sia idealo, nome tiu de Mozart, sed baldaŭ li devis retiriĝi al Bonno pro la morta malsano de lia patrino. Intertempe lia patro fariĝis la sklavo de alkoholo, pro tio li estiĝis la prizorganto de la familio, inkluzive eĉ la lernigon de siaj fratoj.

Beethoven havis ĉiam pli fidelulojn en la kortego, kaj kiam Haydn traveturis la urbon Bonno, oni prezentis al li la junan talentan muzikiston Beethoven. La olda majstro aŭskultis kantaton de Beethoven, kaj instigis lin je pliaj studadoj.

En 1792 refoje li vojaĝis al Vieno. La amikeco kun grafo Waldstein ebligis lian duan vojaĝon al Vieno. La grandnobeloj de la urbo kore akceptis la junan muzikiston. Tiun ĉi amikecon kaj dankemon Beethoven eternigis en sia t.n. Waldstein-Sonato. Tiam Mozart jam ne vivis, kaj Beethoven studis ĉe Haydn, sed pro ilia malsama individueco ilia kontakto iom-post-iom interrompiĝis.

La unua publika koncerto de Beethoven okazis en 1795, kaj pliaj sekvis tion en diversaj urboj:



Prago, Berlino, Pozsony, Buda k.a. La eldonado de liaj komponaĵoj estiĝis ĉiam pli profitaj, eĉ li estis la unua komponisto, kiu per la profito de komponado povis vivteni sin, li estis la unua komponisto, kiu povis sendependigi sin de la kortega deĵoro. Li vivtenis sin el instruado kaj komponado.

Beethoven – per sia amiko princo Lichnowsky – interkonatiĝis kun hungaraj grandnobelaj familioj, el kiuj sentimentala interrilato formiĝis kun la familio Brunszvik. Ferenc estis lia amiko kaj Beethoven dediĉis la faman sonaton Apassionata al li. Li ekamis la ĉarman, modestan virinon Tereza, sed pro la socia diferenco li ne povis edziniĝi ŝin. Laŭ la tradicio pro tio Tereza neniam edziniĝis. Tereza dediĉis sian vivon je edukado de infanoj, ŝi fondis la unuan hungaran infanĝardenon.

La karaktero de Beethoven estis flama, samtempe nobla, delikat-senta kaj erudicia; paralele abomena kaj magneta. Li ŝatis la naturon. Komence de la 90-aj jaroj promenante en arbaro, lia akopananta lernanto alvokis la atenton je fajfilludo de paŝtisto, sed li ne aŭdis tiujn sonojn. Tiam li ekatentis la komencantan difekton de siaj oreloj. Tiu ĉi plago faris lin izoata, memfermiĝanta.

En 1801 okazis lia unua komponista koncerto, kiun pluraj sekvis. Ĉio ĉi rezultis grandan sukceson ĉe la publiko, kaj financajn cirkonstancojn; sed la kritiko estis acerba kaj amare-malicema. Liaj artaj sukcesoj ne povis mildigi liajn animajn turmentojn, kiujn sia ĉiam plifortiĝanta orelmalsano kaŭzis. Eĉ liaj kvar leteroj atestas pri tiu; inter ili la plej fama estas la neniam ekspedita malneto, la t. n.

„testamento de Heiligenstadt” (nome li skribis tiun en urbo Heiligenstadt). Beethoven per tiu turniĝante al la tuta homaro, kaj sintezis siajn suferojn, afliktojn, deprimojn: „Ho, vi homoj, kiuj konsideras min moroza, freneza aŭ mizantropo, kiel maljustaj vi estas al mi! ...Konsideru, ekde ses jaroj terura malbono regas min... Mi, kiu naskiĝis kun vigla, arda temperamento, kaj eĉ mi estis inklina je la amuziĝo de societa vivo; mi trudiĝis, apartiĝis kaj izolite, solece devis vivi....

Kiel mi konfesintus la falemon de tiu mia talento, kio devus esti pli perfekta ol ĉe aliuloj, kio eĉ iam vere mi estis tro perfekta, kiel pliuloj inter miaj samtempuloj... mia malfeliĉo duoble estas dolora, ĉar pro tio oni miskonas min.

Tiel mi devas vivi, kiel ekzilito... Ne multe mankis, ke ne mi mem metis finon de mia vivo... Sole la arto retenis min de tio. Mi sentis, ke neblas forlasi tiun ĉi mondon antaŭ ol mi estus kreinta tion, je kio mia alvokiĝo kvalifikas min... Mia Dio, Vi vidas mian koron, Vi konas min, Vi scias, ke homamo kaj bonvolo loĝas en mi... Kiu estas malfeliĉa, konsoliĝu pri tio, ke mi estas samsortulo, kiu malgraŭ ĉiu obstaklo tamen mi faris ĉion laŭeble por ke mi leviĝu al la vico de la veraj artistoj kaj homoj...”

Do, li aliris ĝis la abismoj de malesperiĝo kaj morto, sed la ŝato de la vivo estis pli forta en li. Liaj artaĵoj – komponataj dum la tempo de lia testamento – fanfaronas triumfantan vivoforton. La difekto de liaj oreloj fariĝis fatala dum la lasta jardeko de lia vivo.

Post la franca revolucio, la militaj revoluciaj ondoj ektaŭzis la normalan viv-ordon de Vieno. Beethoven multe kaj pasie politikis. Li entuziasmiĝis por la respubliko, libereco, nacia sendependeco. Jerome Bonaparte, la reĝo de Vestfaliao invitis lin al sia kortego kapelestro, promesante altan salajron. Samtempe ankaŭ la aristokrataro de Vieno invitis lin kontraŭ 4000 Ft-j da ĉiujara rento. Li aprobis la obligacion, sed pli poste ofte per malrapida kaj malagrabra tribuala proceduro li ricevis la promesitan salajron.

Komence de la 1810-aj jaroj Beethoven interkonatiĝis kun la mekanikisto Mälzel, kiu okupiĝis eĉ pri la fabrikado de aŭtomataĵoj. La mekanikisto persvadis la komponiston komponi ŝikan batalmuzikon. Je la impresado de la „batalo de Vittoria” (Italio) Beethoven komponis la artaĵon sub titolo „Batalosimfonio”, en tiu krom la aŭtomato de Mälzel rolas eĉ vera orkestro, precipe latuninstrumentoj. La premiero akiris grandan sukceson, kaj Beethoven subite fariĝis centro de la vivo de Vieno, li estis la heroo de la tago, fiero de la nacio. Okaze de la kongreso de Vieno Beethoven komponis solenan kantaton, reĝoj kaj imperiestroj aplaudiis al li. Beethoven ricevis honordiplomon de la magistrato Vieno, ĉie li estis kronita de gloro, la

pentroartistoj kaj desegnistoj majstre prezentis lin kun sombra frunto.

En 1811 li renkontiĝis kun Goethe, sed la karaktero de tiuj du talentuloj tre diferencis unu de la alia. – Fama anekdoto fariĝis pri tiu renkontiĝo kun titolo „Princa promeno”. Tiu temas pri tio, dum Goethe evitas la renkontajn princojn, Beethoven kunplektante siajn brakojn trairas ilian vicon kaj akceptas iliajn amikecajn salutojn.

En la 1820-aj jaroj ĉiam pli progresis lia malsano, lia surdeco faris lin ĉiam pli senfida kontraŭ lia ĉirkaŭantaro. Kvazaŭ ĉiujare li transloĝiĝis al alia loĝejo, iliaj servistinoj, mastrumistinoj nelonge toleris ĉe li. Li vivis inter neglektitaj, mizeraj cirkonstancoj, li vivis kaj komponis. Lia eksteraĵo fariĝis bruta, foje la ĝendarmoj malliberigis lin je punkto pro lia suspekta konduto. Tamen, malgraŭ lia malbonfamo multaj vizitis lin, ĉar li apartenis al la famuloj de Vieno, li estis grumblema, avara, skrupulema, stranga, afliktanto de siaj kunuloj – samtempe plene boneca kaj edifa, varmkora, sindona kaj fidela. En tiuj senmoraligantaj jaroj li pleje preferis la gajan societeton, la malĝojon forgesigatan trinkadon de vino. Liaj publikaj roloj finiĝis.

Beethoven dum jardekoj preparis sin je la muzika esprimo, komponado de la „Ĝojo”. Per tiu li volis donaci la homaron. Li provis ĉerpi inspiron el la artaĵoj de Homeros, Shakespeare, Goethe, Schiller. La homo estas la unusola vivanta estaĵo kiu lernakiris ridi, rideti kaj esprimi sian ĝojon. Pro la lukto, ŝtormo de la vivo, pro la jugo de la tiranoj malaperadas la ĝojo kaj rideto de sur la mieno de la homo; sed la miraklofara forto de la muziko resorĉas tiun per sia artaĵo, kiu recitas la ĝojon per forgesiga blindigo. Tre malfacile li trovis la finan solvon. La premiero okazis la 7-an de majo 1824 en Vieno. Beethoven partoprenis la prezenton de tiu, sed li estis tiom surda, ke li ne konstatis la furiozan aplaŭdegon, ovacion de la publiko.

La pens-riĉeco, la forma strukturo kaj idea enhavo de la 9-a simfonio je nova vojo tiris la muzikon de la 19-a jarcento. La 9-a simfonio ĝis nun ne havas konkuranton. La genieco de Beethoven kiel ĉiela eterna brilo lumas en la imperio de la absolut-muziko.

Post longdaŭra grava malsano (hepata cirodo, poste pneŭmonito) li mortis la 26-an de marto 1827. Dum la tago de lia enterigo la lernejoj kaj vendejoj ne funkciis, estis fermitaj. Dudekmil funebrantoj akompanis lian kadavron sur lia lasta vojo.

*

La dum jaroj fermentigitaj kaj en muziknotoj eternigitaj komponaĵoj de Beethoven montriĝis temporezistaj. En iu ajn koncertejo de la mondo liaj komponaĵoj kapablas enŝteli sin al la koro de la publiko. Tion li herediĝis al ni.

János Patay

UNIKA SPECIALA VAGONARO

En la titolo rolanta vagonaro temas pri tiu vagonaro, kio okaze de la 900-jara mortodatreveno de la hungara reĝo Sankta Stefano, en la jaro 1938 ekiris je tutlanda rondvojaĝo – laŭ preciza plano de itinero trairante laŭeble la plej multajn hungarajn komunumojn – por prezenti la plej gravan kaj valoran ŝtatan relikvon de Hungario, nome la „Sankta Mandorso”-n – la balsamitan dekstramanon – de la ŝtatfondinta hungara reĝo Sankta Stefano.

La jaro 1938 eĉ duoble estis sankta jaro por Hungario, ĉar alkroĉiĝis la XXXIV-a eŭkaristia kongreso kaj la memorfesto pri la 900-jara datreveno de la morto (la 15-an de aŭgusto) Sankta Stefano, nia apostola reĝo. La ŝtata, eklezia, nacia kaj kristana momentoj kompletigis unu la alian en tiu festoserio. Komuna kulmino de la du festoj estis la tutlanda migrado de la „Sankta Mandorso”, kaj fariĝis la simbolo de la nacia unueco.

Por transporti la Sanktan Mandorson, MÁV konstruis teknike specialan fervojan vagonon dum kvar monatoj, kiun kune kun alkroĉiĝantaj vagonoj oni nomas „orvagonaro”. La relikvion transportanta vagono, alinome „orvagono” estas klasikaĵo de la hungara plana kaj ornama artoj. La orvagonaro konsistis el lokomotivo kaj kvin vagonoj. Meze de la vagonaro estis la orvagono, kaj ĉe ambaŭfine du-du luksaj vagonoj, en kiuj kunveturis ekleziaj kaj civilaj altranguloj. La siatempa „Vasúti és közlekedési közlöny” (Fervoja kaj trafika

bulteno) detale priskribas la orvagonaron jene: „Nur la orvagono havas eksterordinaran, ornaman eksterajon, la ceteraj estas normalaj rapidtrajnaj vagonoj. La lokomotivo havas unusolan ornamon: grandegan krucon sur la antaŭa parto; vespere oni iluminas ĝin. Tiu ĉi aspekto estas neforgesebla, precipe kiam la lumanta kruco disvolvas el la malproksima malhelo, kaj proksimiĝante ĉiam pli pligrandiĝas.”

Laŭ la priskribo de la orvagono ne nur la specialaj eksteraj kaj interna ornamoj, sed ankaŭ ĝia formo diferencas de la normalaj rapidtrajnaj vagonoj. Rigardante la eksterajon, ĝia flankvando etendiĝas pli malsupren por ke ĝi kaŝu la mekanismajn parton de la ĉasio. Okulfrapa estis la granda aperturo de la ambaŭflankaj flankvandoj por vidi la Sanktan Mandorson. Tiu ĉi aperturo etendis de la planko ĝis la tegmento de la vagono: 1790 mm-jn alta kaj 3300 mm-jn longa. Por fermi ĝin senbrue moviĝanta (en orumita kadro situanta) ŝovopordego funkciis.

La interno de la vagono konsistis el unu granda kaj du malgrandaj salonoj. La granda salono prezentis la Sanktan Mandorson, la du malgrandaj salonoj (sur la du finoj de la vagono) rezervis ripozlokon por la krongardistoj. De tie ĉi oni funkciigis la ŝaltilojn de la lumigado kaj la mekanismon de la ŝovopordegoj.

En la mezo de la granda salono situis speciala risorta stablo, sur kiu dumvoje estis la





relikvokesto; ja oni zorgeme devis defendi la relikvon kontraŭ ĉiu danĝeriga skuiĝo. Precipe oni devis defendi kontraŭ la vertikalaj skuadaj movoj kaŭzataj ĉe relfinoj kaj trakforkoj. La ŝovoj povas okazi el ĉiuj direktoj (ekveturo, bremsado, relfino, kurbiĝaj malebenoj), pro tio la risorta stablo devis defendi la ŝovojn el ĉiu direkto laŭ sama elasteco.

La enigo kaj eligo de la relikvujo okazis sur eltirebla planko funkcia sur gum-ruliloj.

La flankvandon de la orvagono dekoraciis or-, arĝent-, purpur- kaj verda koloraj bildoj de hungaraj sanktuloj István (Stefano), Gellért (Gerhardo), Imre (Emeriko), Gizella (Gizela), Margit (Margareta), Mór (Maŭro), László (Ladislao) kaj Erzsébet (Elizabeta); krome la jarciferoj 1038-1938 fanfaronis la jubileon de la sankta reĝo. Sur la tegmento de la vagono estas la kopio de la Sankta Krono inter kvar preĝantaj anĝeloj, nokte oni iluminis tiun.

Inter la jaro 1938 kaj 1942 en 22 urboj la orvagonaro ne nur ekhaltis, sed en la urbo oni publike prezentis la relikvon. Dum la migrado de la orvagonaro la plej signifaj, gravaj stacioj estis en pli ol kvardek urboj, inter ili reĝaj, kaj historie gravaj urboj, ekz. Esztergom, Székesfehérvár, Pécs, Vác, Győr, Komárom, Szombathely, Sopron, Veszprém, Zirc, Kalocsa, Szeged, Kecskemét, Debrecen, Eger, Miskolc, Érsekújvár, Léva, Pannonhalma, Balassagyarmat, Rozsnyó, Beregszász, Munkács, Sátoraljaújhely, Ungvár, Nagyvárad. La orvagonaro veturis sur precize difinita itinero, en ĉiu stacio malrapide ĝi antaŭeniĝis, la loĝantaro senĉapele, genuante salutis,

honoris la Sanktan Mandorson, kiun oni povis vidi nur tra la vitromuro de la vagono.

Laŭ ĝia itinero oni dekoraciis la staciojn kaj la bariergardistajn dometojn, la popolo de la vilaĝoj kun ekleziaj flagoj procesie marŝis al la fervojstacio. Ĉe la limo de la departementoj delegacio akceptis la orvagonaron, kiu haltis kelkajn horojn en urboj, kelkajn minutojn en la interaj stacioj.

La akcepton de la Sankta Mandorso la vilaĝoj/urboj per inĝeniaj solvoj klopodis fari memorinda, kaj pli poste konservi en albumo. Ekzemple en la urbo – iam reĝa – Székesfehérvár atendis la relikvion kun speciale formita ruĝa velurkaleŝo kun ok samstaturaj blankaj noblaj ĉevaloj, surdorse koĉeroj vestitaj laŭ verdaj eksmodaj soldatuniformoj. En Miskolc oni transportis per speciale elformita aŭto, en Szombathely oni akceptis kun kanonpafoj. Inter lokoj Pálmonostor kaj Szeged gelernantoj – starantaj je aŭdo-distanco – atendis la orvagonaron, kaj kiel „vivanta telefono” telegramis: „Venas reĝo Stefano!”.

La „Asocio de Hungaraj Krongardistoj”, la „Historia Komisiono de MÁV”, la „Fervojhistoria Parko”, la „MÁV Nostalgia L.R.S.”, la „Kultura Fonduso de Budakeszi” kaj la reprezentantoj de „Szent István Baziliko” organizis „spiritan atelieron” por originale rekonstrui la (en 1938 fabrikitan, Da 6020 registro-numeran) orvagonon ĝis la jaro 2013, nome je la 975-jara datreveno de Sankta Stefano; – eĉ tiucele kolektas mondonacon.

Kompilis: **János Patay**

FAKAJ INFORMOJ

Por la pasaĝeroj

La novaj estroj de MÁV tenas grava tasko la kreskigon de la liverado. Tiucele jam en pluraj regionoj (Pécs, Szeged) oni aranĝis konsultadon kun la urbestroj de la koncernaj regionoj. Lastfoje tiu okazis en urbo Fonyód. Tiun partoprenis Ilona Dávid, la nova prezidanto de MÁV, Csaba Ungvári kaj László Pál vic-generaldirektoroj, kaj la urbestroj de sep ĉebalatonaj urboj. La reprezentantoj prezentis siajn rimarkojn, proponojn, spertojn koncerne la fervojon. La estroj de MÁV informis ilin pri la evoluigo, pri la kurt-kaj mezdistancaj planoj de MÁV. La celo de la MÁV-estraro estas kreskigi la nombron de la pasaĝeroj per pli altaj kvalitaj liveradoj. Estonte okazos similaj renkontiĝoj en pliaj regionoj.

*

Kunlaboro de MÁV kaj polico

La prezidanto de MÁV, Ilona Dávid kune kun pluraj altrangaj policaj estroj (landa, ĉefurba, uzina poliestroj) inaŭguris la renovigitan policejon de la stacidomo Budapest-Nyugati. La rekonstrua laboro kostis 64 milionojn da forintoj. Sur 200 m²-a areo kulturitaj kontoroj estas je dispono al la policistoj kaj civitanoj por solvi problemojn. En iu plej frekventata stacidomo establiĝis fervoja polic-subsekcio. MÁV emfaze tenas al si grava la sekuron de personoj kaj havaĵoj. La polico ne sola zorgas pri la ordo, ja fervojgardistoj kaj armilaj sekuraj gardistoj de MÁV kunlaboras, helpas ilian profesion laboron.

*

Rekonstruoj sur linio Budapest-Szolnok

MÁV Zrt efektivas grandiozan modernigon en naŭ stacioj kaj haltejoj de la itinero Budapest-Újszász-Szolnok. Per la rekonstrua laboro, renovigo, aranĝado de la medio ĉirkaŭ la stacioj, respektive konstruo de pluvteggmentoj, MÁV rezervas modernajn, komfortajn kondiĉojn (modernajn necesejojn, atendejojn, giĉetojn ktp.) konsiderinde ankaŭ la invalidajn pretendojn de la invaliduloj. La novaj konstruaĵoj kaj pluvteggmentoj konformas al „tipoplanoj”, nome la kaheloj, ekipaĵoj, mebloj, lumigiloj montras unuecan konstruan fizionomion. La konstruaĵoj estas ekipitaj kun klimat- kaj hejtad-instalaĵoj. Laŭbezono en kelkaj stacioj/haltejoj oni renovigis ankaŭ la kajojn. Sur sep stacioj/haltejoj oni elformis

„P+R” (signifas: parku kaj veturu plu) kaj „B+R” (signifas: gardita parkejo) parkejojn. – Kiel nova sistemo (laŭ la bonsukcesa provo en urbo Gyömrő) en pluraj lokoj MÁV komisiis la lokan instancon pri la funkciigo de la modernaj stacidom-konstruaĵoj.

*

La fervojo estas la kresto de la trafiko

En la Hungara Fervojhistoria Parko okazis la centra soleno de la 62-a Fervojista Festo. En la plej signifa festo de la fervojista socio okazis la proklamo de la fervojoficistoj; 101 gefervojoficistoj ĵuris pri la plenumo de la laŭleĝaj ordonoj kaj preskriboj, kaj la alproprigitajn sciojn ili dediĉas je la altigo de la fervoja trafiko.

Post la oficistproklamo kaj la ministro, kaj la prezidanto de MÁV honoris 292 fervojistojn por ilia elstara rezulthava laboro.

Lászlóné Németh, nacia evoluiga ministro emfazis en sia festparolo: „La fervojo havas estonton en Hungario.... La kabineto preferas la porkolektivon interkomunikadon kontraŭ la privataj solvoj... Registara komisaro inspektadas la procedojn... Fiksa celo estas la kongruigo de la porkolektivaj trafikaj horaroj...”

La ŝtatestekretariino Sára Hergmanné Nemes emfazis tiun klopodon, ke la fervojo reakiru sian respekton de la socio.

La prezidanto de MÁV, Ilona Dávid parolis pri tio, ke post la longa repremigo la fervojo reakiru sian gvidan rolon en la porkolektiva trafiko.

Krom la centra aranĝaĵo multaj kulturaj kaj sportaj eventoj okazis dise en la lando dum la 62-a Fervojista Festo.

*

Evoluigoj sur la fevojlinio Budapest-Esztergom

En junio komenciĝis grandioza rekonstrua laboro sur la 53 km-jn longa fervojlinio. En la liniosekcio inter Pilisvörösvár-Esztergom oni rekonstruas 33 km-jn da trakaro, pro tio la fervoja trafiko provizore paŭzas de Pilisvörösvár ĝis Esztergom, resp. Nyergesújfalú; anstataŭe oni veturigos la pasaĝerojn per aŭtobusoj. Ĉar la linio estas unutraka, oni konstruas entute 2 km-ojn da staciaj trakoj por plifaciligi la eviton de renkonte trafikantaj trajnoj. La novaj elektronikaj sekurigaj instalaĵoj ebligas redukti la veturtempon, ja per tiu la nuna 60 km-a rapideco altiĝos je 70-100 km-a.

Post la trakonstruo de la stacioj altiĝos la nivelo

de la pasaĝertransporto, kaj P+R kaj B+R parkejoj plifaciligos la alir-eblecon de la stacioj.

*

FLIRT motortrajnoj

Printempe de j. 2007 ekfunkciis la unuaj t.n. Flirt motortrajnoj. Nuntempe jam 60 tiutipaj veturiloj transportas la pasaĝerojn de MÁV sur la linioj Budapest-Komárom-Győr, Budapest-Pusztaszabolcs, Budapest-Hatvan; krome nur semajnfine sur linioj Budapest-Szob, Budapest-Cegléd-Szolnok, kaj Budapest-Újszász-Szolnok. Sur tiuj linioj, kie trafikaj tiutipaj trajnoj, ĉesis la malaltiĝo de la pasaĝer-nombroj, eĉ sur kvar linioj altiĝis je 111 procentoj. La energio-konsumo de tiutipaj trajnoj estas malpli altaj kompare kun tiuj de la tradiciaj rapidtrajnoj. La fabrika firmao zorgas pri la bontenado kaj purigado en uzinejo de Pusztaszabolcs.

*

Bremsoteknikaj evoluigoj

Eksterordinare gravas la bremsoteknikaj kontroloj sur la tereno de la bontenado de la fervojaj veturiloj. Entreprenaj reglamentoj preskribas la kontrolajn mezur-taskojn dum la bontenadaj riparoj. Ĝis nun tre komplikaj estis la kontroloj de la bremsblok-fortoj. MÁV Maŝinproviza Divizio-Servo ekde j. 2012 havas specialan aparaton, per kiu oni povas kontroli, ĉu laŭ bremskalkulo taŭgas tiu bremsblok-forto, per kio la bremslokoj premiĝas al la rado. La ebla „superbremsado” kaŭzas „radrond-platiĝon”, aŭ la „subbremsado” plilongigas la „bremsadistancon”; eĉ povas kaŭzi rektan akcident-danĝeron. Per la instalaĵo de tiu ĉi aparato la malkovro de la menciitaj mankaĵoj simpliĝas. La blokoj de la mezursistemo porteblas en industriaĵoj por surloke funkciigi en iu ajn veturilriparejo.

Kompilis: **János Patay**

MÁV OFICISTKLERIGA INSTITUTO JUBILEAS

La Oficistkleriga Instituto de MÁV ĉi-jare jubileas sian 125-jaran datrevenon. La Instituto formis sian devizon jene: Profesio-Evoluo-Tradicio (Alvokiĝo-Progreso-Tradicio). Oni malfacile povas trarigardi ĝian 125-jaran vivovoĵon, ja dume la tekniko neimageble rapide evoluigis, sed paralele la du mondmilitoj grave skuas la mondon, kion la hungara fervojo, inkluzive la Instituto ne povis eviti. Eĉ dume la fervojo vole-nevole havis pli streĉitan rolon pro sia speciala profesia tasko, sekve de tio ankaŭ la Instituto. Tamen koncize, telegramstile ni trarigardu ĝian aventuran vivon.

Dum la 1860-aj jaroj fariĝis necesa la teoria klerigo de la fervoja personaro. En la pli gravaj pozicioj la gvidantoj devis koni la politikan, militaferan, kulturen kaj ceteran interrilatojn de la ŝtato kun la fervoja trafiko. La kreskanta rolo de la fervojo pretendis la plialtiĝon de la trafika organizo, ja la fervojo bezonis multflanke klerigitajn fervojistojn.

La 18-an de januaro 1883 Gábor Baross, la tiam trafika ŝtatestro – pli poste porpublik-labora kaj trafika ministro – prezentis skriban proponaĵon al la parlamento por ekfunkcii Fervojan Oficistklerigan Kurson. La 3-an de septembro 1887 komenciĝis la unua fervoja kurso, kion mem la ministro Gábor Baross inaŭguris en konseruaĵo de la ĉefurba strato Király n-ro 69.

La ministro Gábor Baross la 26-an de aŭgusto 1890. inaŭguris la rezidejon, la konstruaĵon de la fervoj-, poŝt- kaj telegram-kursoj sur la strato Luther. La 1-an de septembro de la sama jaro jam ĉi-loke komenciĝis la instruado, de post tiu tempo samloke ĝi funkciis eĉ nuntempe.

La Fervoja Oficistkleriga Kurso seninterrompe funkciis ĝis la fino de la studjaro 1913/14, ja tiam eksplodis la unua mondmilito. Pro tio en la studjaro 1914/15 estis milita paŭzo de la instruado. Pro la milito ĝis la 1921/22 studjaro oni povis studi nur

kiel hejmaj lernantoj.

Post la fino de la mondmilito sekvis evoluo, sed dum la 1932/33 studjaro la kurso refoje paŭzis pro la tiam ekonomia krizo.

Dum la dua mondmilito ŝanĝiĝis la fakinstruaj taskoj. En la 1942/43 studjaro finis pli ol 400 fervojoficistoj, ĉar la areo de la lando kreskis per la reaneksitaj teritorioj. Pro la milito oni traorganizis la kursojn je koresponda sekcio, ja la trafiko bezonis la laboron de la studentoj.

La mondmilito kaŭzis grandegajn damaĝojn al la lando, same al la fervojo. Post la milito okazis signifaj ŝanĝoj. De la jaro 1945 la nomo de la



MÁV Oficistkleriga Instituto

Instituto aliigis je Hungara Ŝtata Trafika Kleriga Instituto sub la direktado de la Ministerio. Tiutempe oni devis ebligi plenuman deĵoron ankaŭ por virinoj. De la 1945/50 studjaro plurcent virinoj akiris fervojoficistan klasifikon.

Ekde la 1960-a studjaro ekvalidiĝis la t.n. „Organiza, Reglamenta, Kleriga, Disciplin-proceda kaj Ekzamena Regularo” laŭ kiu funkcias „nepublika sekcio” kaj „koresponda sekcio”.

Nova kleriga koncepto ekvalidiĝis ekde la 1972/73 studjaro; laŭ tiu disiĝis la trafika instruado kaj la komerca instruado.

Ekde 1980 la Instituto havas la nomon: „Oficistkleriga kaj Plukleriga Instituto de MÁV.”

De la 1983/84 studjaro oni enkondukis novan studobjekton: nome la informadikon; tiucele la Oficistkleriga kaj Plukleriga Instituto de MÁV epikis precize, moderne instalitan prelegejon, studĉambron.

Daŭre evoluis ankaŭ la teknika klerigo: komence tiu de la konstrua kaj traktbontenada fako, poste ĝi disvastiĝis ankaŭ je ponto-fako, telekomunikada kaj trakregeja fako, trakvetulira kaj trakcia fakoj.

Dum la daŭro de la kleriga reformo en 1970 oni estiĝis kvin regionaj Instruaj Centroj (Miskolc, Debrecen, Szeged, Pécs, Szombathely).

En 1997 oni planis estiĝi Fervojsistemo

Akademion kunlabore kun la Széchenyi István Altlernejo de Győr, sed ĝi ne efektiviĝis. Anstataŭ tio oni traorganizis la pli fruajn regionajn instruunuojn je instrufaka administracio.

La Instrua Centro de Budapeŝto ankaŭ estonte organizas supergradajn instruajn, klerigajn, respektive transfakigajn kursojn; informadajn kursojn, kaj lingvokursojn.

Koncerne la lingvokursojn, nepre oni devas mencii, ke dum la 1980-aj jaroj okazis ankaŭ intensaj Esperanto-lingvokursoj laŭ fakultativa studobjekto, kiujn komence gvidis D-ro István Bácskai, pli poste Pál Kristek, fine János Patay. Fine de la studjaro la studentoj faris ekzamenon pri Esperanto, kaj la kvalifiko estis registrita en ilia studatesta libro.

La 125-jara historio de la fervoja instruado – fondita de Gábor Baross – iris longan vojon por tio, ke altnivele klerigu kaj disponigu eminentajn fervojistajn fakulojn al la hungara fervojo.

Ni, hungaraj fervojistaj esperantistoj – unue kiel iamaj studentoj, pli poste eble ankaŭ instruistoj de tiu Instituto – kore gratulas okaze de la 125-jara jubileo, kaj deziras, ke la posteuloj daŭrigu tiun noblan taskon je la bono de la hungara fervojo – je la restarigo kaj kreskigo de la reputacio de la hungara fervojo.

János Patay

NI FUNEBRAS

ISTVÁN PÁL

(1926 — 2012)

La 14-an de aŭgusto 2012, en sia 86-jara aĝo mortis István Pál. El inter ni forpasis eminenta fervojisto, estimata kolego, elstara figuro de la fervojista Esperanto-movado.

En niaj memoroj li aperas, kiel gvidanto de la plansekcio de Vagonripara Uzino en Miskolc. Krom sia faka laboro ĉiam li trovis tempon kaj eblecon por sia multkolora agado, kiun li faris por la kolektivo.

En 1975 aperis lia verko, vekanta sensacion, kies titolo estas: „Sur la transa flanko de la relvojo”, en kiu li verkis la historion de sia laborejo. Lia verko enhavas 270 dokumentojn kaj fotojn. Li verkis ankoraŭ kelkajn librojn kaj aliajn verkaĵojn, kaj liajn sinsekvajn verkojn karakterizas precizeco kaj sentroige ni povas diri, li estis kronikisto de la fervojista vivo de urbo Miskolc.

Li estis aktiva esperantisto inter 1957 kaj 1992. Li agadis en la Esperanto-grupo „Verda Vojo” troviĝanta en la Vagonripara Uzino. Li ne nur uzis, ankaŭ instruis nian lingvon. El lia 15 parta kursomaterialo multaj lernis, eĉ kelkaj instruis la lingvon dum multaj jaroj.

Pro siaj deca maniero, helpemo, kaj bona organiza kapablo baldaŭ li iĝis gvidanto de la movada laboro. Komence li estis estrarano, poste prezidanto de la Esperanto-grupo „Verda Vojo”. Plej ofte li reprezentis sian grupon en la jarkunsidoj de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Li estis la sekretario de la Teritoria Komitato de HEA en departemento Borsod-Abaŭj-Zemplén. Li helpis kaj gvidis la agadon de la Esperanto-grupo troviĝantaj en la departemento, organizis lingvokursojn kaj ekzamenojn. Li estis motoro de la Esperanto-movado.

Liajn verkojn, fotojn konservas la flaviĝantaj folioj de libroj kaj revuoj, lian personecon, la eventojn de la kune pasigitaj tempoj ni stokos en nia memoro.

Ripozu en paco!

Hungara Fervojsista Esperanto-Asocio



Skulptaĵoj en la parko antaŭ la galerio de naiva arto en Hlebine



La 65-a kongreso de IFEF kaj la kongreso de UFE okazos de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en Francio en Artigues-pres-Bordeaux. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio